BOLETIN

DE LA FEDERACION ESPERANTISTA ESPAÑOLA

AÑO VII N.° 2 (74) FEBRERO, 1955

SIN MENOSCABO

Se puede afirmar que el nexo más consistente entre los componentes de una nación, es su idioma. Él es el que aúna los sentimientos, expresa los comunes deseos y fervores, y posibilita las cualidades sociales del ser humano. Fuera del límite fronterizo, la misma o parecida raza, con los mismos sentimientos y anhelos, pero con diferente idioma, viene a ser, para los habitantes de la nación limítrofe, algo muy distinto, separado y extraño, en virtud de la diferencia de lenguaje, lo que acarrea necesariamente la incomunicación, la incomprensión y la extrañeza, cuando no la animadversión. Por lo mismo, resulta lógico que un francés considere como igual a un canadiense, que procede de otro continente, y no a un alemán, que es colindante suyo; y por la misma razón es obvio que un español considere como su igual a un chileno, que casi es su antípoda, y mida por otro rasero a un francés, con el que, sin embargo, tiene tantas relaciones geográficas, raciales y hasta religiosas.

Esta realidad, que nadie ignora, nos lleva a considerar, como esperantistas, las resultantes afectivas que el idioma común, Esperanto, produce entre súbditos de las más apartadas y distintas naciones. Entre esperantistas, sea cual fuere su nacionalidad, raza, religión o tendencia política, se establece indefectiblemente una relación de afecto, confianza y hermandad, que no resulta proporcional a la mayor o menor proximidad de las respectivas naciones, sino exclusivamente al mayor o menor dominio del idioma común, que produce la mayor o menor facilidad para el intercambio de ideas, que a su vez generan los sentimientos. Cuando, con el andar de los tiempos, el Esperanto sea corrientemente usado, no solamente como idioma oficial internacional, sino espontáneamente para todo trato con personas de otras naciones, ese sentimiento

BOLETIN
de la
FEDERACION ESPERANTISTA ESPAÑOLA
BULTENO
DE HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO

Adreso de la Redakcio kaj Federacio
Str. Pelayo, 7, 1.a
VALENCIA
Telefonoj: 19532 kaj 53579
Oficej - horoj
9 ĝis 13'30 kaj 15 ĝis 20
Sabate: nur 9 ĝis 13
Kunvenejoj
Marde: Str. Ruzafa, 7 (Casa Chaume)
De 22'30 ĝis 24
Sabate: Montepio de la Dependencia Mercantil
Str. San Vicente, 67, 1.a
De 15'30 ĝis 18
Kotizoj de la Federacio
Simpla membro: 15 pesetojn jare
Membro-abonanto: 50 pesetojn jare
Membro-subtenanto: 80 pesetojn jare
La membroj de la du lastaj kategorioj ricevas la Bultenon. La subtenantoj ricevas du ekzemplerojn.
Eksterlanda abono al la Bulteno: 50 pesetojn jare
Monsendojn adresu al:
S-ro Ernesto Hurtado
Str. Pelayo, 7, 1.a - VALENCIA

VIVO SAMIDEANA

En la hejmo de nia estimata samideano kaj kunlaboranto, membro de la Akademio de Esperanto, S-ro Juan Régulo Pérez, La Laguna (Kanaria Insularo) regas eksterordinara ĝojo, de la 18-a de pasinta Januaro, kiam nova filino Isabel eniris por pliigi la nombron de la membroj de tiu esperantista familio. Gratulon plej koran!

ĈU AUSTRA ESPERANTO - ORKESTRO AL NIA LANDO?

Oni informis al ni, ke grava entrepreno en Valencia estas en rilato kun la Fervojista Esperanto-Orkestro, de Linz, Donaŭ, Aŭstrio, por venigi ĝin al Valencia dum la venontaj festoj de Marto *(Les Falles).* Oni diris al ni, ke la membroj de tiu orkestro ludos vestitaj en siaj tipaj regionaj vestoj. Ni ĝojos, ke tiu sciigo estu vera, por saluti kaj konatiĝi kun niaj aŭstraj samideanoj. Se ni ricevos konfirmon de tiu novaĵo, ni sciigos niajn legantojn.

afectuoso, que actualmente impera entre esperantistas, y que produce ese agradable clima moral en que se desenvuelven las reuniones internacionales esperantistas, sufrirá, lógicamente, una disminución en su intensidad, como la ha sufrido, históricamente, la íntima hermandad que reinaba entre los primitivos cristianos. La mayor amplitud del ambiente disminuirá lógicamente la densidad de la atmósfera afectiva, pero, sin duda alguna, la humanidad habrá ganado con el uso del idioma común, no solamente un medio fácil y perfecto para la mutua comprensión, sino, además, el instrumento imprescindible para lograr el acercamiento y la buena consideración entre los componentes de las más diversas razas y colores. Este fenómeno, que todo lingüista puede prever, y que todos los esperantistas consideramos como cierto, puede hacer concebir a ciertos espíritus suspicaces, el temor a un debilitamiento del afecto patrio, y una disminución de los valores nacionales. Dejando de lado toda consideración dialéctica, y aduciendo tan sólo los hechos concretos que nos ofrece la realidad, podemos afirmar que el uso del idioma internacional y el nacimiento del sentimiento de hermandad que origina entre personas de distintas naciones, no debilita, en manera alguna, el sentimiento patriótico, el amor a nuestra historia, a nuestro suelo, a nuestras características nacionales y regionales, y, aunque parezca paradójico a muchos, a nuestro idioma nacional y hasta a nuestras costumbres y peculiaridades regionales. Los mejores esperantistas son, al propio tiempo, afortunados cultivadores de las letras patrias, y el Esperanto es, para todos, un medio insustituible, único, para poder difundir por todo el mundo, y a todo el que venga a nuestro país, las excelencias de nuestro solar, de nuestra alma nacional y, como tantas veces se ha realizado, el mejor vehículo para traducir, para todos, las galas de nuestra incomparable literatura.

NOVAJ LIBROJ

Recenzistoj esprimas ĉi tie siajn proprajn juĝojn pri verkoj.
La Redakcio kaj la Estraro de H E F estas tute sendependaj de iliaj opinioj.

ATAKOJ KONTRAŬ ĜARDENPLANTOJ, Paul Neergaard, Licenciato de Hortikulturo, Doktoro de Agronomio kaj Sekciestro ĉe Ŝtata Plantpatologia Servo, Kopenhago. — Eldonita de The Esperanto Publishing Co. Ltd. 234 paĝoj, formato 23 x 16 cm. 75 nigraj bildoj kaj 9 tabuloj kun kolorbildoj. Tole bíndita. Prezo 125 pesetoj plus 5 % por afranko. Akirebla ĉe Libroservo de Hispana Esperanto - Federacio, Pelayo 7, Valencia.

Ni salutas, kun ĝojo kaj danko al la aŭtoro kaj eldonistoj, ĉi tiun bonegan libron, interesa kaj utila por ĉiuj kiuj sin dediĉas al la hortikulturo kaj bezonas koni la malsanojn de la plantoj, sekve de la atakoj de ĉiaj parazitoj, kaj kiel batali kontraŭ ili. La libro estas reverko de la tria eldono de danlingva verko de la sama aŭtoro, sed tial ke ĉi tiu estas verkita por danaj cirkonstancoj, la esperanta eldono havas multajn ŝanĝojn kaj aldonojn, por ke ĝi povu esti uzata en eksterlando, kvankam nur en mezvarmaj terzonoj, ĉefe Nordeŭropo, Kanado, norda parto de Usono kaj kelkaj aliaj regionoj kun simila klimato. La libro enhavas ĉapitrojn, priskribantaj jenajn temojn: Ĉu oni profitas per la klopodado. Simptomoj. Kaŭzoj de atakoj. Malsanoj kaj damaĝbestoj de la ĝardeno. Kondiĉoj kiuj favoras la ekatakon. Ŝprucigado. Pulvorado. Elmeto de venenbrano. Ŝprucrimedoj kaj pulvoroj. Ŝprucigiloj kaj pulvoriloj. Ĉu la venenoj prezentas danĝeron? Ne sufiĉas nur ŝprucigi. La luktado tra la jaro. Konsulteblaj institucioj. Bibliografio. Terminaro. Ĉiuj ĉapitroj estas interesaj por tiuj personoj kiuj sin dediĉas al ĉi tiu branĉo de la agrikulturo, sed por esperantistoj ĝenerale treege utilas la terminaro, kiu enhavas multe da radikoj kaj esprimoj kiuj riĉigas nian vortaron, niaopinie kelkaj kun rajto aperi en la Plena Vortaro, kiel ekzemple la sufikso ***icid*** signifanta ***venenon kontraŭ,*** kiu formas la vortojn ***insekticido, fungicido*** ktp.; ***patogena, infesti*** k. a.

La lingvo estas bona, la papero luksa kaj la prezento impona, kio faras la libron plaĉa kaj montranta la gravon kaj seriozon de Esperanto. Eĉ por nefakuloj la verko estas havinda laŭ propaganda vidpunkto.

J. B.

LEGU KAJ RIDU, de K. O. Schmidt, formato 12 x 16'5 cms., 88 paĝoj. Eldonejo S. Ziegler, Engelbertstrasse 7, München-Pasing, Germanujo. Akirebla ĉe Libroservo de Hispana Esperanto-Federacio. Prezo 28 pesetoj.

La gaja titolo de ĉi tiu nova verketo jam logas al legado. Farinte tion mi konstatis, ke la enhavo plene akordas kun la titolo: Trafe elektitaj spritaĵoj, en malavara abundo, havigas la valoran donacon de agrabla tempopasigilo.

S-ro Schmidt, kun delikata bonhumoro, sukcesas per facila maniero prezenti ĉarmajn amuzaĵojn, kiuj, krom ŝerce ridigaj, estas tute senĝene tradukeblaj. Tial, por komencantoj, ili estas facile kompreneblaj en ĉiuj siaj plej subtilaj nuancoj, rilate signifon kaj sencon, alkutimiĝante tiel al rekta lingvouzo, preskaŭ senaverte. Tamen, la plenkapablaj esperantistoj, tute certe, ankaŭ ĝuas plezurajn momentojn, legante ĉi tiun belan volumeton, kiun varme mi rekomendas precipe al la gejunulaj rondoj.

Restas nur diri, ke la libro estas zorge presita —kiel decas al la eldonejo de S-ro S. Ziegler— kun kovrilo el verda kartono, kies okulfrapa bildo estas plia invito al forgeso de l' malĝojo.

Oscar Corróns.

POST LA KURSO, de Wilhelm und Hans Wingen, Perfektiga libro de Esperanto, eldonis Verlag der Limburger Vereinsdruckerei, Limburg/Lahn, Germanujo.

Ĉi tiu germanlingva lernolibro estas tre taŭga por esperantistoj, kiuj jam trapasis la unuan kurson kaj eĉ mi konsideras, ke se oni atente studas ĉion ĝis la fino, certe la esperanta kapableco estos kompleta. Ĝi ankaŭ signifas ke la movado en la germanlingvaj landoj fariĝas pli forta kun la paso de la tagoj, ĉar oni povis eldoni tiel kompetentan kaj belaspektan lernolibron. Mi gratulas la eldonejon pro ĝiaj klopodoj havigi taŭgan lernolibron.

Kune kun ĉi tiu lernolibro, oni havigas en aparta volumo ***Ŝlosilon*** pri ĝiaj ekzercoj.

M. Rodríguez.

XVI-a HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO

23 - 27 de Julio de 1955

Adreso de la Organiza Komitato: Grupo Esperantista del Centro Asturiano
Paseo de Begoña, 26-28, GIJON, Asturias

LITERATURA KONKURSO

Kun la celo stimuli la verkemon de poetoj kaj prozistoj, precipe tiuj el la ibera duoninsulo kaj iberamerikaj landoj, Hispana Esperanto-Federacio faras publikan vokon, ĝentile invitante ilin partopreni per la fruktoj de sia inspiro en la Literatura Konkurso, kiun oni anoncas laŭ jenaj reguloj:

1. La Konkurso konsistas el la kvar sekvantaj branĉoj:

A) Originala Poezio: Soneto, kun libera temo, aŭ anstataŭe Madrigalo kun ne pli ol tridek versoj.

B) Originala Prozo: Konciza rakonto pri popola kutimo, festo, moro, legendo aŭ fabelo plej karakteriza en urbo aŭ vilaĝo de hispana, portugala aŭ iberamerika regiono. La tuta amplekso ne estu pli longa ol 1500 vortojn.

C) Traduka Poezio: Esperanta traduko el versaĵo, klasika aŭ moderna, libere elektata inter la ekzistantaj en la lingvoj: hispana, portugala kaj en tiuj propraj de kelkaj hispanaj regionoj. Maksimuma amplekso: kvindek versoj.

Ĉ) Traduka Prozo: Esperanta traduko el fragmento de rimarkinda verko el la literaturo de tiuj antaŭe cititaj lingvoj. Maksimuma amplekso: 300 vortoj.

2. La konkursaĵoj estu prefere maŝinskribitaj. Sendu tri ekzemplerojn. En la tradukoj aldonu samnombrajn kopiojn de la originala teksto, indikante la nomon kaj, laŭeble, etan biografion pri la koncerna aŭtoro.

3. Oni asignas unu premion kaj unu subpremion al la du plej bonaj verkoj prezentataj en ĉiu el la kvar branĉoj.

4. Ĉiu premiito ricevos artobjekton kaj diplomon.

5. La konkursaĵoj estos akceptataj ĝis la 1.ª de Majo de 1955.

6. Skribu sur ĉiu konkursaĵo pseŭdonimon kaj, en aparta koverto, kun la sama pseŭdonimo, klaran indikon pri la vera nomo kaj adreso de la konkursanto.

7. Sendu ĉion al la oficejo de Hispana Esperanto-Federacio (Pelayo, 7 - Valencia) kun facile videbla surskribo: *Literatura Konkurso.*

8. Trimembra komisiono atente legos kaj trastudos ĉiujn konkursaĵojn por fari sian juĝon, kiu aperos en la Julia numero de BOLETIN, kun la premiitaj pseŭdonimoj, sed ankoraŭ ne kun la nomoj de ties aŭtoroj, kiuj fariĝos publikaj dum la Literatura Vespero solene okazonta, kiel programero de la XVI.ª Hispana Kongreso de Esperanto, en Gijón.

LUIS HERNANDEZ, Sekretario de la Konkurso

KONGRESALIĜILO. Kun ĉi tiu numero de BOLETIN, ni sendas la kongresaliĝilon, kiun, ni petas, bonvolu plenigi kaj sendi, kun la koncerna mono al la Organiza Komitato, kiel eble plej baldaŭ.

Todo el Mundo debe saber dos Idiomas: el de su Pais y el Esperanto

BRILA VENKO KAJ HEROA VENKINTO

Dum longaj monatoj la tuta esperantistaro streĉe atendis la disvolviĝon de la Unesco-konferenco en Montevideo, ĉar oni konsciis ke ĝi estis markonta novan periodon en la evoluo de la ĝenerala opinio pri Esperanto kiel lingvo kaj kiel movado.

Se la afero estus rilatinta nur al scienca aŭ teknika aspekto de la lingvo, ni ĉiuj estus gardintaj neŝanceliĝeblan flegmon, ĉar ĉiu esperantisto bone konscias pri ĝia absoluta taŭgeco por plenumi ĉiajn postulojn por venki kaj gajni la konsideron kiel oficiala internacia helpa lingvo. Sed ne estis tiel; ni ĉiuj konsciis pri la preskaŭ nevenkeblaj malfacilaĵoj kaj insidoj, kiuj minacis nian aferon. Ĵaluzo, antaŭjuĝoj, egoismo kaj, ĉefe, absoluta nescio pri nia lingvo kaj ĝia indeco. Jen la malamikoj de nia entrepreno! Kaj ili ludis gravan rolon en la disvolviĝo de nia problemo. Tial U. E. A., antaŭzorgante pri taskoj, danĝeroj kaj minacoj, bone preparis la kampanjon kaj sendis por tiu okazo sian plej bonan, kompetentan kaj lertan reprezentanton: Ivo Lapenna!

Kiam ĉiuj esperantistoj ekkonos la detalan evoluon de tiuj travivaĵoj, kiuj laŭ nia informo estos priskribataj en *Esperanto*, la oficiala organo de U. E. A., ili tiam povos ĝuste taksi la streĉan dramon, kiu okazis dum pasinta Decembro en Montevideo, kaj la heroecan rolon, luditan de nia defendanto, al kiu seninterrompe helpis tutkore kaj plensukcese la urugvaja samideanaro. Kaj tiam, ankaŭ ĉiuj povos bone juĝi la supermezuran meriton de niaj samideanoj: Lapenna, Fernández Menéndez, Cao (ŝi kaj li) kaj ĉiuj montevideanoj, kiuj, konsciante pri la eksterordinara graveco de tiu historia momento, ne ŝparis penon, laboron nek oferon, kaj entuziasme kunlaboris por sukcesigi nian aferon en tiuj emociaj tagoj, kiam Esperanto povis esti ĉu forĵetata, ĉu honorigata. Post la senesperiga unua rezulto, venis la reago, la lukto, la konkero de la meritita privilegia pozicio kaj, fine, la venko. Tiu venko signifis, ne nur la elstaran situon de Esperanto en la monda kultura medio, sed ankaŭ la premion por la luktintoj. Ni ne volus engluti la dekonon de la amareco sorbita de Lapenna dum preskaŭ la tuta konferenca periodo, sed ni konscias pri la mielo gustumita de li post la venko, plejparte atingita de li, de liaj grandaj meritoj, de liaj titanaj klopodoj kaj de liaj lertaj manovroj.

En Montevideo nia afero havis la ĝustan defendanton. Estis granda beno por ni, ke Lapenna estis tie, ĉar Esperanto bezonis tiam: poligloton, advokaton, diplomaton kaj oratoron. Kvar elstaraj personoj devis defendi niajn rajtojn kaj niajn karajn esperojn. Li tutsola estis la kunfandiĝo de tiuj kvar personecoj, kaj ni povas aserti ke li impresis kaj mirigis ĉiujn delegitojn. De nun, kiam li leviĝos por pledi por nia afero, neniu kuraĝos kontraŭstari lin per stultaĵoj kaj mokoj. Ĉiuj konscios ke la rozo estas dornhava!

Boletín, interpretante la penson de H. E. F. kaj de la tuta hispana samideanaro, esprimas sian ĝojon pro la atingitaj rezultoj en Montevideo, dankas el la fundo de l' koro Profesoron Lapenna pro lia heroe kolosa agado kaj deziras al U. E. A. ke dumlonge ĝi havu tian meritoplenan advokaton.

D-ro Rafael Herrero.

HISPANA KRONIKO

Madrida Esperanto-Klubo en sia Ĝenerala Kunsido de pasinta 13-a de Novembro elektis jenan novan Estraron: Prezidanto, J. López Herrero; Vicprezidanto, Dario Rodríguez; Sekretario, Florencio Enfedaque; Kasisto, Antonio Arias; Bibliotekisto, Dionisio Nieto; 1-a Voĉdonanto, Valentín Ladrero; 2-a Voĉdonanto, Juan Calahorra, Ĉi tiu Estraro jam komencis labori tre aktive, ĉar la plenumendaj taskoj estas pezaj kaj gravaj, kaj ĉiun estraranon regas granda entuziasmo.

DIVERSAĴOJ

Ĉiu membro de nia Federacio aŭ abonanto de nia bulteno, sendinta solvon de enigmo, gajnos unu poenton. Gajnintoj de 10 poentoj ricevos libropremion. Ni akceptos solvojn ĝis la 1-a de Aprilo.

Ni ricevis la korektan solvon de la enigmo numero 14 el jenaj samideanoj: J. A. Daniel, A. Escamilla, P. Naranjo, J. Armadams, M. Fernández Méndez, J. Silva, S. Roca, J. M. Fontcuberta V. Monsalve kaj E. Miralles. Atingis la 10 poentojn S-anoj V. Monsalve, A. Pérez Saura, J. Silva kaj P. Naranjo. Sekve, ni sendas al ili la libropremiojn.

SOLVO DE LA ENIGMO N.° 14


Horizontale: 1 Amas, muta. 2 Peruk, tenor. 3 Ilaro, ekiro. 4 Okor, taks. 5 Oga, ana. 6 Iĝ, al, ni, ar. 7 Fest, kelo. 8. Oni, teo, ĉef, 9 Ni, pulmo, ne. 10 Maleolo. 11 Rigardeti.

Vertikale: 1 Api, ĉifono. 2 Melo, ĝeni. 3 Arako, si, mi. 4 Surogat, pag. 5 Koral, tula. 6 Teler. 7 Tetan, omod. 8 Mekanik, ole. 9 Unika, eĉ, ot. 10 Tors, alen. 11 Aro, trofeo.

ENIGMO N.° 16

Krucvorta enigmo, de Juan Devís.

Malsupra figuro.



Horizontale: 1 (rad) Pisti grenon por fari farunon, sporta glitilo. 2 Grado de varmo. 3 (inv) Prepozicio, (inv) defendo antaŭ juĝisto, kolekta sufikso. 4 De supernatura estaĵo, lirika poemo, (rad) akvomaso ĉe supraĵo de maro. 5 Rilata al dramparto, dono de mono por kvitigi ŝuldon. 6 Alvenigu al iu. 7 Hebrea vorto signifanta «tiel estu», frapo. 8 (rad) Manĝebla veg. kun dika radiko, malproksimeco. (rad) haŭta malmolaĵo. 9 Sufikso, (rad) longa bluzo, malaserto. 10 (inv) Grandega fosilia reptilio vivinta en la kretaceo. 11 (inv) Malplezuro pro manko de okupiteco. kanto konsistanta el tri partoj.

Vertikale: 1 Enuiga, arbo konifera. 2 Kuracilo. 3 Sufikso sen difinita senco, (rad) Homo tre forta, interj. por kuraĝigi. 4 (inv) Ciuj kune, (rad) malsaneca ruĝa ŝvelaĵeto sur la haŭto, (rad) havi ideon pri ies karaktero. 5 Felo preparita por industriaj uzoj, plenkrede. 6 Jako. 7 Vulgara nomo de la natria klorido, (rad) interezo. 8 Kaj tiel plu, (rad) malsupra kaj antaŭa parto de la koksosto, (rad) g. de grandaj mevoj. 9 Nedifina pronomo, (inv) grajno el kiu oni faras la ĉokoladon, pronomo de dua persono. 10 Granda simio el la insuloj Sumatro kaj Borneo. 11 Regula aranĝo de aferoj, ŝmiri per grasa fluaĵo.

EN LERNEJO

Patro iras al la instruisto por plendi pro la malbonaj ekzamen-kvalifikoj, kiujn lia filo ricevis. La instruisto suferas lian amason da protestoj kaj fine diras al li:

—Tio estas ĉar la ekzerco de via filo estas egala al tiu de lia dekstra kamarado.

—Bone —respondas la patro—. Ĉu ne povas esti ke lia kamarado kopiis la ekzercon de mia filo?

—Ne, sinjoro. La ekzerco konsistis en dek demandoj. En la naŭ unuaj la respondoj de ambaŭ estas la samaj. Sed en la deka, lia kamarado skribis: «Mi ne scias», kaj via filo: «Mi ankaŭ ne».

FEDERACION ESPERANTISTA ESPAÑOLA

TESORERIA

BALANCE EN 31 DE DICIEMBRE DE 1954

ENTRADAS

Cuotas atrasadas	665'—		
Cuotas año 1954	25.825'—	26.490'—	
Por anuncios y venta Boletines	750'70		
Donativos durante el año	2.869'—		
Líquido obtenido Lotería Navidad	3.104'—	6.723'70	33.213'70

SALIDAS

Cuota U. E. A. año 1954		1.275'—	
Material y gastos Secretaría	650'—		
Gastos Tesorería	671'85		
Correo y varios	874'85		
Diplomas	1.510'—		
Medallas «Literatura Konkurso»	440'—	4.146'70	
Edición del Boletín	24.575'50		
Fajas y gastos de envío	2.990'50	27.566'—	
Gastos y material difusión	1.071'—		
Gastos por Servicios Federación	937'45		
A Libro-Servo para obras	1.000'—	3.008'45	35.996'15

Déficit en el año 1954	2.782'45
Existencias en 1.° Enero 1954	3.236'50
Saldo en 31 de Diciembre 1954	454'05

DETALLE DEL SALDO:

En efectivo	265'05
Cuentas deudoras	189'—
Suma	454'05

Valencia, 31 de Diciembre de 1954

El Tesorero, *Ernesto Hurtado*

SECRETARÍA

En la reciente votación para la nueva Junta Directiva, han resultado elegidos los siguientes Sres.:

Presidente:	Dr. Rafael Herrero Arroyo	— ***Valencia***
Vicepresidente:	D. Mariano Solá Montserrat	— ***Tarrasa***
Secretario:	D. Ernesto Hurtado Alvarez	— ***Valencia***
Vicesecretario:	D. Adonis González Meana	— ***Ciaño Santa Ana***
Tesorero:	D. Ernesto Guillem Tarín	— ***Valencia***
Vocal 1.°	D. José Guzmán Guzmán	— ***Valencia***
» 2.°	D. Darío Rodríguez L. de Silva	— ***Madrid***
» 3.°	D. A. Pedro Marqueta Roy	— ***Zaragoza***
» 4.°	D. Luis de Otaola y Fayón	— ***Bilbao***

Los nuevos miembros de la Junta Directiva tomarán posesión de sus cargos, tan pronto se reciba la aprobación oficial, de acuerdo con las vigentes disposiciones legales.

El Secretario, ***Vicente Santamaría***

SERVICIO DE PRENSA Y RADIO

Este Servicio ha terminado su labor de estadística sobre publicaciones y emisiones sobre Esperanto. Sin embargo dicho trabajo no es completo, porque no recibimos información de todo lo publicado y radiado. En consecuencia rogamos a todos cuantos se ocupan de las secciones permanentes de Esperanto en la prensa y de las emisiones de radio, comuniquen a este Servicio el número de artículos y emisiones durante el año 1954.

El Encargado del Servicio, Darío Rodríguez, Galileo, 51, Madrid

☆ LA LERNEJO

LERNU TRADUKANTE

Inter la sendintoj de korektaj tradukoj ni distribuos premiojn, laŭ samaj kondiĉoj kiel por la enigmoj.

Samideanoj V. Monsalve, S. Roca, A. Escamilla, J. Anguita, E. E. Yelland, A. Criach, M. Vallés, E. Pons, F. Lledó, M. Fernández Méndez, M. Buscató kaj J. M. Fontcuberta sendis korektajn tradukojn.

Jen la plej korekta traduko, kiun ni petas, bonvolu komparí kun la viaj:

Kiam mi estis dekokjara, mia familio komisiis min al la zorgo de parencino, kiu estis ironta al Toskano por aranĝi iujn aferojn, en akompano de sia edzo. Prezentis sin bela okazo por igi min entrepreni vojaĝon, fortirante min tiel de tiu malutila nenionfarado de la gepatra domo kaj de la provincaj urboj, kie la unuaj pasioj de la animo koruptiĝas ofte pro manko de aktiveco. Mi foriris kun la entuziasmo de junulo, kiu vidas antaŭ si leviĝi la kurteno de la plej belegaj spektakloj de la naturo kaj de la vivo.

Por nova tasko, jen alia peco de la sama romano:

Viví en un estado de continua embriaguez durante los interminables días de espera que precedieron a la marcha. Y este delirio, renovado a cada hora por las magnificencias de la naturaleza en Saboya, en Suiza, sobre el lago de Ginebra, en los ventisqueros del Simplón, en el lago de Como, en Milán y en Florencia, no desapareció hasta el día de mi regreso. El trámite de los asuntos que habían llevado a mi compañera de viaje a Livorna se prolongaba tanto, que se habló ya de volverme a Francia, sin haber visto aún las ciudades de Roma y Nápoles. Esto equivalía a arrebatar mi ilusión más preciada, cuando estaba a punto de conseguirla. Protesté interiormente contra semejante idea.

ATENTU!

La bela esperantlingva artikolo pri Valencio, kiun laŭ rekta komisio verkis nia amiko Luis Hernández por la grava turisma revuo *Valencia Atracción*, estas jus eldonita en aparta ilustrita faldfolio kaj tute senpage akirebla, petante ĝin per simpla po tkarto al jena adreso:

Sociedad Valenciana Fomento del Turismo
Bajos del Ayuntamiento — Valencia, Hispanio

ESPERANTO-KALENDARO 1955, eldonita de La Verda Kolombejo Esperanto-Grupo, Ciaño Santa Ana (Asturias), Hispanujo. Prezo: 3 pesetoj aŭ 1 internacia rpk.

AFIŜO PRI ESPERANTO, eldonis Limburger Vereinsdruckerei G. m. b. H., de Limburg-Lahn, Diezerstrasse 17/19, Postfach 39, kun germanlingva teksto «Esperanto die Weltsprache». Oni povas aĉeti ĝin ĉe la eldonejo. Prezo 0.60 ĝis 0,30 gm., laŭ aĉetota kvanto.

BILIDKARTO PRI DOKTORO ZAMENHOF, eldonis Limburger Vereinsdruckerei G. m. b. H., de Limburg-Lahn, Diezerstrasse 17/19, Postfach 39. Oni povas aĉeti ĝin ĉe la eldonejo. Prezo 0,20 ĝis 0,10 gm. laŭ aĉetota kvanto.

● Nova esperantisto, 14-aĝa liceano ĉe Liceo Lurgal, deziras korespondi kaj interŝanĝi. Robert Hourlade, 16. Rue du Nord, París 18, Francio.

● Ni deziras aĉeti la librojn «Quo Vadis?», de Sienkiewicz (L. Zamenhof), 2 volumoj, kaj «Vocabulario Esperanto - Español y Español-Esperanto», de Vicente Inglada Ors. Ni pagos laŭdezire. Libroservo de Hispana Esperanto - Federacio, Pelayo 7, Valencia.

● Francisco Caballer Sesé, Liria n.° 2, Bugarra, Valencia, deziras korespondi kun la tuta mondo.

P. RIS-G. VÍA M. TURIA, 28 VALENCIA